



1910 J.

I JARO

20/3 de Septembro

## Kaukaza Esperantisto

Duonmonata literatura kaj propaganda gazeto.

Jarabono: 1 rub.—1,06 sm., duonjare 60 kop.—0,60 sm.

Tarifo por anoncoj: 1 paĝo—6 rub. (6,30 sm.), 1/2 paĝ.—3 r., 1/4 paĝ.—1 r. 50 k., 1/8 paĝ.—75 k., 1/10 paĝ.—50 kop. Adresoj de samideanoj nur 10 kop.

Adreso: Tiflis, Elizavetinskaja strato № 17, Hajk Ter-Astvacatrijanc.

## Кавказекій Эсперантистъ

Двухнедельный литературный и пропагандный журналъ.

Подписка платя: На годъ 1 руб., на 6 м. 60 коп.

Объявленія: Страница 6 руб. (построчно: строка цѣтита 10 коп., передъ текстомъ 20 коп.).

Адресъ: Тифлисъ, Елизаветинская ул. № 17, Аяку Теръ-Аствацатрянцу.

## ԿՈՎԿԱՍԵԱՆ ԷՍՔԵՐԱՆՏԻՍՏ

ԳՐԱԿԱՆ ԵՒ ՊՐՕՊԱԳԱՆԴԱԿԱՆ ԵՐԿՇԱԲԱՐԱԹԵՐԹ

Բամսեզինը՝ տարեկան 1 ռ., 6 ամիսը 60 կոպ.

Յայտարարութիւնները երեսը 6 ռ., կէս երեսը 3 ռ., զատորը՝ 1 ռ. 50, ութերորը՝ 75, տասերորը՝ 50 կ. Լասցեն՝ Քիֆլիս Ելիզաւետինսկայա փ. Պ 17. Հայկ Տեր-Մատաւոտրեանցին:

## კავკასიის ესპერანტისტი

օրցկւորցի սալիգերագորո ճ սաքրօպագանձօ ժւրնալի.

Մոլիորի փսի 1 ձ., ղլլլլլի տօլտ—60 կաք.

Редакция открыта ежедневно отъ 5—7 ч. вечера.

# ОСЕННИЕ КУРСЫ ЯЗЫКА „ЭСПЕРАНТО“

ПРИ 1-ОЙ ТИФЛ. МУЖСКОЙ ГИМНАЗИИ  
открываются 19 сентября, в 11 часов дня.

Желающие могут записаться съ 5-20 сентября по воскресеньям  
отъ 11—12 ч. дня и по средамъ отъ 7—9 ч. вечера.

**ПЛАТА ЗА ВЕСЬ КУРСЪ ОДИНЪ РУБЛЬ.**

## AL NIAJ LEGANTOJ

La ĵurnalo «Kaŭkaza Esperantisto» de nun estos presata en la propra presejo «Esperanto». Malgraŭ niaj penoj, pro multo da teknika laboro pri presejo, ni ne povis siatempе апериги la 10-an numeron. Tial nun aperas duobla numero 10—11, sed poste, kiel ĉiam, la ĵurnalo aperados ĉiujn 1-an kaj 15-an daton.

## НАШИМЪ ЧИТАТЕЛЯМЪ

Несмотря на то, что мы всячески старались своевременно выпустить № 10, но, по независящимъ отъ насъ обстоятельствамъ, издание журнала опоздало до сегодняшняго дня. Потому мы на этотъ разъ выпустили двойной номеръ 10—11. Послѣ этого журналъ по обыкновенію будетъ выходить каждыяго 1 и 15 числа мѣсяца.

## ՄԵՐ ԲԱԺԱՆՈՐԴԵՆԵՐԻՆ

Ձը նայած, որ մենք ամեն կերպ աշխատում էինք որ առաջ ի լոյս ընծայել № 10-ը, բայց մեզնից անկախ պատճառներիով թերթի հրատարակութիւնն ուշա-

ցաւ ցայտը, ուստի և 10 և 11 համարները միացրինք, որպէս զի գոնէ մասամբ առաջ գցենք թերթի հրատարակութիւնը: Այսուհետև թերթը կ'անոսաւոր լոյս կ'ը տեսնէ իւրաքանչիւր ամսի 1-ին և 15-ին, ինչպէս որ այդ եղել է մինչև այժմ:

## ԳՅՅԵ ՅԱՌՏԵՅՎԵԼՈՅՑ

Միտեցաւատ իցենի լցիս, որոմ տալիս ըրոջե ցամոսլուլոյս մե-10 ռոմբորի շլրնալիս, իցենցան ըամուլոյլոցեբըլ միջեցիս ցամո ըլլեցան ըլամլիս շեղերեբըլ ոյքնա շլրնալիս ցամուլոցեմ: ամիսալոցիս մե-10 ըա մե-11 ռոմբոցեմ շեղեարտըլ ըա ոյբըլ ցեպքեց, որոմ իցենս մկոտեցըլոցեմ ծեցրատ տու արա, լոցըտա տի մանլ ըապեպուլոլոցեմ: ամիս շեմըլլեց շլրնալի ոյցըլ ցամուլոց ցուցըլ: տցիս 1 ըա 15 հոլոցըլոցեմ, որոցորլ ցլինատ ցամուլոլոլա:



## KION AJN ALIAJ DIRU \*)

Egnate Ninoŝvili

Ne indas kompaton nia Petro pro sia malprudenteco, li meritas la malfeliĉon, kiu lin frapis; senbridigis li sian filon kaj lasis lin agi laŭvole, ĉu li ne sciis, ke tiel okazos! Prezentu al vi! li ne kontentigis eĉ de pastra lernejo kaj forsendis lin en universitaton. Kaj jen, kion donis al li la universitato: oni lin ekzilis, do iru li nun kaj serĉu lin!

—Kiam ni diris al li: pro kio vi permesis al via filo rifuzigi de pastreco, sed lerni en lernejo de ĉivila fako? por vi ja estus prefere, se li fariĝus pastro kaj por ĉiam restus ĉe vi, por zorgi pri vi dum la maljuneco.—Do! filo ja ne estas bubalo, kiun oni nutras nur por tio, ke ĝi poste disportadu portajon.—Komencadis li filozofi—ĉu bone aŭ malbone mi jam travivis mian vivon, la morto jam proksimiĝas kaj por mia propra utilo mi ne baros al li la vojon; laŭ lia volo, kaj kiel al li ŝajnas pli utila, konduku li sian vivon. Mia filo jam estas plenaĝa kaj li ne bezonas mian gvidon, mi estas vilaĝa neklera pastro kaj kompare kun li mi nenion scias pri la vivo.—Kaj jen, nun vi vidas, kiel li pruvis sian klerlecon!

—Eĉ dum la estado en la seminario oni povis vidi kia sinjoro li estis: altrangulojn, estrojn, Diservadojn, li nenion konfesis: se antaŭ li preterirus la guberniestro, li eĉ ne demetus la ĉapon.

—Jen nia Stepano, filo de Gabrielo, tia devas esti la homo: li dum la lernado estis kvieta kaj trankvila kaj tia sama estas li en la vivo. Nur antaŭ-

nelonge li fariĝis pastro kaj nun vi rigardu kiel li riĉigis sian familion, malritege restigitan post la morto de l'patro. Kiel dum pluvado pligrandiĝas rivero, tiel same plimultiĝas lia havaĵo.

—Do kion ankoraŭ diri! tian senzorgan vivon, kian ĝuas la pastroj, neniu plu havas en la mondo! Ilia salaĵo ĉiujare pligrandiĝas de regna kaso. Pereis, pereis la malfeliĉa Petro! se sian filon li ne sendus en Rusujon kaj igus lin fariĝi pastro, anstataŭ sia kabanaro li konstruus belegan domon.

—La filo de Petro malestimis la pastrecon! li ĉiutage sidis ĉe amaso da libroj kaj estis ensorbigitaj en ili.

—Kaj tiuj-ĉi libroj frenezigis lin.

—Ne, tion vi ne diru, en tiuj libroj estis skribitaj tiel bonaj aferoj, ke kiam li legis al mi ilin mi ilin opiniis Evangelio.

—Eĉ Andro mem, se li konfidis al iu, iafoje tiel bone predikis, ke similis al Kristo.

—Vi ja memoras: kiam li dum someraj ferioj venis hejmen, li kolektis vilaĝajn knabojn kaj instruis ilin senpage.

—Li eĉ diris: se mi restus konstante hejme, mi eĉ la plenaĝulojn instruus.

—Do Stepano, kiun vi tiel laŭdas, eĉ unu paŝon ne faros por malriĉa homo. Vi diras, li estas riĉa, por kio al ni utilas lia riĉeco!

—Do! laŭ via opinio, estas pli preferinda Andrio, kiu nun nek al siaj utilas kaj nek al aliaj!

—Eh, lasu vi tion, diru nur, pro kio oni ekzilis tiun Andrion?

—Pro tiuj libroj, kiuj similas al Evangelio, kiel nia amiko diras; miaopinie se ili estus io bona, pro tio oni lin ne ekzilis.

\*) La rakonto estis verkita de la aŭtoro en la jaro 1893.

—Estas interese kio estis skribita en tiuj libroj?

—Multo estis skribita! tuta nuntempa stato devas esti ŝanĝita, jen kion oni skribis.

—Kion vi diris! Andrio, kiu ne povis ŝanĝi eĉ siajn piedvestojn sur siaj piedoj, li volis ŝanĝi tutan nian vivon? ha, ha, ha!!..

Tiaj interparoloj kaj diskutoj turniĝis inter najbaroj, post kiam Petro, la pastro, ricevis de sia filo leteron, enhavantan jenon:

„Mia kara patro!

„Oni min ekzilas, kiel krimulon. Mi ŝcias, ke vin tre turmentos ĉi-tiu sciigo. Nur unu sola, mi pensas, faciligos al vi la turmenton: vi kiel patro, bone ŝcias vian filon, kaj povas konjekti, ĉu mi povis fari ian krimon, efektivan krimon?.. Ekmemoru vi la Sanktan Virgulinon, Patriron de Kristo, kaj per ŝia nomo konsolu vin. Via filo Andrio“.

Jen rekompenco! Dum kvindek jaroj, malriĉa, maljuna, eksigita pastro ŝparis nenion por eduki la filon; ne sufiĉan por li mem peceton da pano li dividadis kaj tri kvaronojn de tio forsendadis al la lernanta filo. Tiamaniere, kun granda malfacileco li atingis fine la celon: lia filo estis en lasta kurso de universitato kaj ĝuste en la sama jaro, en majo aŭ julio li estis finanta la lernadon kaj revenonta al sia patro... Eh, kun kia ĝojego atendis la maljuna patro sian amatan filon, kiun li ne vidis jam kvar jarojn! sed anstataŭ la filo li ricevis supre diritan leteron! Do kion nun devis fari la malfeliĉa maljuna patro, kiu krom tiu sola filo, ekster edziĝintaj filinoj, havis nenion? Kaj kiel amis la kompatinda patro sian solan filon! Kiu povas elkalkuli kiom da fojoj li ploris pro malfruigita revido de sia filo! Andrio

estis tri jara, kiam mortis la edzino de Petro. Post tiam li fariĝis por Andrio, kaj patro, kaj patrino. Eĉ bona patrino ne povis tiel zorgi pri filo, kiel tiou faris Petro; Andrio eĉ ne rimarkis sian orfecon dank' al la zorgema Petro. „Dio tiel helpis al mi, ke eĉ ungeto ne rompigiĝis al mia filo, tiel mi lin kreskigis“, kun ĝojo diris li, vidante prudentan, freŝan kaj sanan sian filon. Ekster amo, kiel patro kaj filo, ili amis unu la alian kiel la plej intimaj bonaj amikoj. Andrio estis tre kvieta homo; sed kiam li dum libertempoj revenadis hejmen, patro kaj filo, kiel enamiĝintoj ĉirkaŭbrakis unu la alian. Kiam Andrio estis forveturanta en Rusujon, li penis sin deteni por ne plori dum adiaŭo, sed la patro malsekigis per larmoj sian grizan barbon. Vidante tion, Andrio ankaŭ ne povis sin ekregi kaj sian kvietan vizagon superverŝis per larmoj. Nun, anstataŭ ĉio-ĉi kion ricevis Petro? Lia filo, por kiu li oferis ĉion, kiel ni diris, oni ekzilis kaj kiu ŝcias, ĉu li revenos iam aŭ ne? La vilaĝanoj malestimis Andrion kaj eĉ al Petro sen kompute diris—„jen estas via prudenta kaj klera filo, bonon li faris al vi dum maljuneco!“ Post ĉi ĉio oni estis certigitaj, ke Petro malbenos sian filon, kiu, kiel oni diris, per krimo kronis sian lernadon kaj per abomena karaktero rekompencis maljunan patron.

Sed ĉi-tiuj certigoj ne efektiviĝis: Petro kun amo rememoradis sian filon. „Ne, mia Andrio neniam farus krimon,—diris li—Andrio ne estas profetama, por pro tio fari krimon, li ne estas adultulo, ne estas ekscitema, ne estas sangverŝema! Ne, mia Andrio ne farus krimon. Li havas homaman koron, li neniam faros malbonon al homo, mi pli bone ol iu ŝcias mian

filon, pli bone ol iu mi ellernis lian koron kaj animon; kiu havas tian homamantan koron kaj plenan saĝon kiel Andrio, li neniam faros ian malbonon. Lia ilo estis amanta koro kaj freŝa saĝo. Do pro kio oni lin punis, se li ne estis krimulo, diras al mi malprudentaj homoj! Ĉu, kiujn oni punis en la mondo, ĉu tiuj estis krimuloj? Eĉ Kriston oni ekzekutis, oni lin krucumis: do Apostoloj de Kristo ankaŭ estis krimuloj, ili ja mortis en punado. Ne, kion ajn aliaj diru, mia filo ne devas esti krimulo, li neniam makuligus sin per krimo.

Petro nur pro tio riproĉis la filon, ke li ne prenis lin kune kun si. „Pro kio li ne prenis min! apud li por mi eĉ infero estus agrabla!“ tiel parolis Petro. Li komencis kolekti monon por forveturi al la filo kaj vivi apud li. Sed ne vivis la kompatinda ĝis la efektiviĝo de sia deziro. En unu tago li malsaniĝis, en dua kaj tria—lia malsano pliiĝis. Fine li perdis la konsciencan kaj komencis deliri: Kion ajn aliaj diru!... mia filo ne estas krimulo!... Kriston oni ekzekutis... Oni ne povas makuli, pro filantropo... Mi iras al la filo... al la filo... kaj cet.. Multajn tiajn esprimojn diris Petro, ke li eĉ dum saneco ne povus diri ilin. „Mia Andrio venas, mia Andrio:“... ekkriis Petro lastfoje kaj forlasis la animon.

El la kartvela lingvo tradukis  
V. Ahvlediani

**PLOBANTAJ SALIKOJ**

—  
Apud monto,  
Kie fonto  
Disjetetiĝas de alteco,  
Funebrege en soleco,

Kiel kunaj la amikoj  
Jen kunstaras du salikoj.  
Subfleksinte  
Siajn pintojn,  
Intermiksis la branĉetojn  
Ili kun la fontondetoj;  
Kaj zefir' al ili vole  
Kantas kantojn de konsolo...  
Kiam ĝemo,  
Ĉagrenĝeno  
Dismordetas mian bruston  
Kaj malfermas vundonruston,—  
Mi per paŝoj la mistikaj  
Iras tien,—al salikoj.  
Kaj sub bruo  
De akvfluo  
Mi rakontas pri doloro  
De malsana mia koro.  
Kaj en tiu reva tempo  
Pasas mia la turmento.  
Mi ĝojinte,  
Distriĝinte  
Trankviligas forirante.—  
Arbaj tiuj do konstante  
Kaj matene kaj vespere  
Ploras, ploras malespere.

— S'ind

**N A Z O \***

(De Gogol)

„Estimata sinjoro“, diris Kovalev, sentante sian propran indecon: „mi ne scias kiamaniere kompreni viajn vortojn... La afero, kiel al mi ŝajnas, estas tute klara... aŭ, eble vi volas... sed vi ja—estas mia propra nazo!“

La nazo rigardis majoron, kaj liaj brovoj sulkiĝis.

„Vi eraras, estimata sinjoro; respondis la nazo, „mi estas sendependa,

\*) Vidu la 9-an numeron da „Katka. Esp.“

kaj krom tio al mi ŝajnas, ke inter ni tute ne povas esti iaj malvastaj kaj intimaj rilatoj. Juĝante laŭ butonoj de via vic-uniformo, mi konkludas, ke vi servas en ia alia oficejo“. Dirinte ĉi-tion la nazo deturniĝis. Kovalev tute konfuziĝis, li ne sciis eĉ kion fari kaj kion pensi.

En tiu-ĉi momento ekaŭdiĝis agrabla susuro de virina vestaĵo: montriĝis unu neĵuna virino, tre bone ornamita per punktoj, kaj kun ŝi ankoraŭ unu mal-dika sinjorino en blanka vestaĵo. Post ili staris unu alta hajduko kun grandaj vangharoj kaj kun dekduo da kolunoj. La hajduko malfermis tabakujon... Kovalev alproksimiĝis al la preterirantoj. Li elprenis batistan kolumon de sia duoncemizo, ordigis la sigelilojn, pendintaj sur ora ĉeneto kaj, ridetante je flankoj, atentigis la maldikan sinjorinon, kiu, kvazaŭ printempa floro, facile kliniĝadis kaj alportadis al la frunto sian blankan maneton kun duondiafanaj fingretoj. Rideto sur la vizaĝo de Kovalev pligrandiĝis, kiam li ekvidis el sub ŝia ĉapelo sian rondetan, tre heleblankan mentonon kaj unu parton de ŝia vango, ombritan per koloro de unua printempa rozo; sed—subite li desaltis, kvazaŭ oni lin neatende ekbruligis. Li renemoris, ke ĉe li anstataŭ la nazo vidiĝas nur unu glata loko, kaj el liaj okuloj ek-versiĝis larmoj. Li sin returnis kun nepra decido—diri al sinjoro en uniformo: ke li efektive estas granda kanajlo, kaj malnoblulo, due ke li nur sin ŝajnigas regna konsilanto kaj trie, ke li estas propra nazo de majoro Kovalev... Sed la nazo, bedaŭrinde, jam malestis: ĝi gajniĝis la tempon por forveturo, kaj kredeble veturis al iu sinjoro vizite.

Ĉi-tiu fariĝo malesperigis Kovalev-on. Li reiris kaj haltis sub la kolonaro,

je unu minuto, peneme serĉante la misteran sinjoron,—la nazon. Kovalev tre bone memoris, ke la nazo havis ĉapelon kun plumoj kaj uniformon kun ora kudraĵo; sed li rimarkis nek lian palton, nek koloron de lia kareto, nek liajn ĉevalojn kaj nek ankoraŭ tion,—ĉu estis sur lia kareto en la malantaŭa iu lakeo, kaj al tio en kia liv reo.

Krom tio sur la strato veturis tiel multe da karetoj, ke Kovalev tute ne povis rimarki ian kareton, kaj se li iamaniere ekkonus la serĉatan kareton, li tute ne havus rimedojn ĝin haltigi. La tago estis bonega kaj varmega. Sur la Nevskij prospekto estis granda amaso da homoj.

La sinjorinoj, kvazaŭ flora akvoŝalo, iradis sur la prospekto, komencante de Policejskij ponto ĝis Aničkina ponto. Jen montriĝis sur la strato konata al Kovalev kortega konsilanto, kiun Kovalev nomis subregimentestro, precipe tiam, kiam ĉeestis geatskultantoj. Jen ankoraŭ montriĝis Jariĵkin, fakestro en senato, granda amiko de Kovalev.

Jen—alia majoro, kiu ricevis asesoron en la Katkazo, vokas Kovalevon por ke li alproksimiĝu al li...

„A, diablo prenu vin!“ diris Kovalev; „he, veturigisto, veturigu min rekte al poliestro!“ diris Kovalev evitante la malagrablan renkonton kun alia majoro.

Kovalev sidigis en kaleŝon, kaj nur petis veturigiston, ke li rapidege lin veturigu.

„Ĉu poliestro estas hejme?“ demandis Kovalev, enirinte en ĉambron.

„Lia poliestra moŝto malestas hejme“, respondis pordisto, „li ĵus forveturis“, „jen kia malagrabla okazaĵo“, diris Kovalev.

„Jes“ daŭrigis la pordisto: „lia moŝto nur ĵus forveturis kaj se vi venus

pli frue eĉ je unu minuto, vi nepre lin trovus hejme“.

Kovalev, ne deprenante la naztukon de l'vizaĝo, residiĝis en la kaleŝon kaj kriante diris al veturigisto: „veturigu!“

„Kien?“ demandis la veturigisto.

„Veturigu min rekten!“ respondis Kovalev.

„Kiamaniere—rekten? Ĉi-tie estas ja returno. Nu, ĉu dekstren aŭ maldekstren?“

Ĉi-tiu nova demando de l'veturigisto devigis lin ion iomete pripensi.

Li, estante en tia mizera situacio, devus nepre serĉi la finon de mistera fariĝo en la magistrato de bonkonduco, ne nur tial, ke la agado de l'lasta estis kvazaŭ kunligita kun la agado de polico, sed tial, ke la ordonoj de Magistrato estis pli rapidflujaj ol en ia alia institucio; serĉi do la kontentigon en tia oficejo, kie servis la Nazo, estis tute superflua kaj krom tio stranga, ĉar la lasta respondo de la Nazo pruvigis, ke li ne havis ion sanktan, ke li povis tre facile mensogi tielsame, kiel li mensogis en la lasta renkonto kun Kovalev, asertante lin, ke lia persono tute ne estas konata al li... Kovalev jam volis veturi magistraton, sed subite en lia kapo ekaperis unu bela penso. Kovalev nur timis, ke tiu-ĉi Nazo, kanajlo kaj rabisto, kiu en la lasta fojo tiel senkonscience parolis kun li, povus, profitante la tempon, forveturi el la urbo kaj tiam ĉiuj serĉadoj fariĝus vanaj kaj superflujaj. Fine, ŝajnis, ke Kovalev-on la ĉielo mem prudentigis. Kovalev decidis iri en gazetan ekspedejon, por presi gustateme gazetan anoncon pri ĉiuj trajtoj de la nazo, kiun ĉiu homo devus aŭ venigi al Kovalev dum la renkonto kun ĝi aŭ almenaŭ nepre ekscii ĝian loĝejon. Decidinte ĉi-tion Kovalev ordonis al veturigisto nepre vetu-

ri en gazetan ekspedejon, kaj dum tuta vojo, Kovalev nur batis per pugnon veturigiston en dorson, dirante: „veturigu pli rapide, malnoblulo! Rapidege, fripono!“

„Eli, sinjoro!“ diris nur la veturigisto balancante la kapon kaj batiute per kondukilo la ĉevalon, kiu havis longan lanon same, kiel ĉe hundo.

Fine la kaleŝo haltis kaj Kovalev malfacile spirante, enkuris malgrandan akceptĉambron, kie apud tablo sidis griza, maljuna oficisto el malnova frako kaj kun okulvitroj. Li havis en buŝo plumingon kaj kalkulis la akceptatan kupran monon.

„Kiu akceptas ĉi-tie la anoncojn?“ ekkriis Kovalev. „A, bonan tagon!“

„Mian respekton al vi!“ respondis la maljuna oficisto, leviginte je unu minuto la okulojn kaj poste ankaŭ remalleviginte en la dismetitan aron da inono.

„Mi volas ion presigi!“ diris Kovalev.

„Bone! Bonvolu, mi petas, malmulte atendi“, elparolis la oficisto, metante unu ciferon sur la paperon kaj movigante per pugno de l'maldekstra mano du poentojn sur la kalkulilo. Unu lakeo kun galonoj kaj sufiĉe pura eksterrafo, kio argumentas, ke li estas en aristokrata domo, staris apud la tablo kun noteto en manoj kaj parolis: „Kredu al mi, sinjoro, ke la hundo ne kostas eĉ dekdek kopekojn, t. e. ke mi ne donos por ĝi eĉ ok groŝojn; sed la grafino tre amas ĝin, je l'Dio, tre amas, kaj estas preta doni al la trovinto de tiu-ĉi hundo eĉ cent rublojn! sed, se diri laŭ konveno, gustoj de l'homoj estas tute nekunigeblaj, kiel ekzemple niaj; se iu homo estas ĉasisto li devas nepre havi ĉashundon aŭ pudelon; li ne devas avari,—pagu kvincent, milion da rubloj por hundo

sed nepre akiru bonan hundon“.

La respektinda oficisto aŭskultis ĉi-tion kun granda kaj signifa m'eno kaj krom tio kalkulis kiom da literoj havis la alportita noteto. Sur la du flankoj staris multe da maljunulinoj, komercistoj, malsanulistinoj kaj kortistoj kun notetoj. En unu noteto estis skribita pri iu veturigisto de bona konduto, en alia—pri ne sufiĉe bona kaj nova kaleŝo, kiu estis alveturita en Rusujon el Parizo en la jaro 1814. En aliaj notetoj estis skribitaj pri korta bubino, scianta lavejan metion kaj al tio taŭga por aliaj laboroj; pri fortikaj kaleŝoj sen unu risorto; pri juna, flamiĝema deksepjara ĉevalo; pri novaj ricevitaj el London grajnoj de rapoj kaj rafanetoj; pri somerloĝejoj kun komforto, nome: kun du staloj por ĉevaloj kaj unu loko, sur kiu oni povas fari grandan kaj bonegan betulan aŭ abian ĝardenon; k. t. p. k. t. p.

La ĉambro, kie sin trovis ĉi-tiu nomita societo estis malgranda kaj la aero en ĝi estis tre densa; sed... kolegia asessoro Kovalev ne povis senti la odoron, ĉar li havis naztukon sur la vizaĝo, kaj ankoraŭ tial, ke lia nazo, nur Dio scias, kie sin trovis en nuna momento.

„Estimata sinjoro, permesu al mi... mi havas aferon...“, diris fine Kovalev kun videbla netoleremeco.

„Tuj, tuj!.. Du rubloj kaj kvardektri kopekoj!“ parolis maljuna oficisto, ŝetante rekte en okulojn de l' maljunulinoj kaj kortistoj iliajn notetojn.

„Kion vi volas?“ demandis fine oficisto, turniĝinte al Kovalev.

„Mi petas...“ komencis Kovalev: „kun mi okazis unu friponaĵo—kion mi ĝis nuna tempo ne povas ekscii. Mi nur petas vin, ke estu presita en gazetoj sekvanta anonco:—se iu homo alkondukos al mi la tiun friponon,

malnoblulon, li ricevos sufiĉe bonan rekompencan“.

„Ĉu mi povas ekscii vian herednomon?“ demandis la oficisto.

„Por kio vi volas ekscii mian nomon? mi ne povas ĝin diri al vi! Mi havas multe da gekonatuloj, ekzemple: Ĉeltareva, edzino de regna konsilanto, Pelagea Grigorjevna Podtoĉina edzino de stab-oficiro.... Subite ili ekscios pri mia akcidento, ho, gardu min Dio! Vi povas nur simple skribi: kolegia asessoro, aŭ pli bone—majoro“.

„Ĉu forkuris via korta servanto?“ demandis scivoleme la oficisto.

„Ne, kia korta servanto! ĉi-tio ne estus granda friponaĵo! Forkuris de mi... la nazo!“

„Hm... kia stranga herednomo! Kaj multe do ŝtelis ĉe vi, ĉi tiu Nazov?“ demandis kun miro la maljuna oficisto.

„La nazo, ho... vi ne komprenis min! Mia propra nazo perdiĝis, kaj mi ne scias kie, ĝi nun sin trovas. Eble la diablo volis ekŝerci kun mi!“

„Kiamaniere do perdiĝis via propra nazo? mi tute ne povas vin kompreni!“

„Mi mem ne povas al vi diri kiamaniere ĝi perdiĝis; sed mi nur scias, ke ĝi veturas sur la stratoj kaj sin nomas regna konsilanto“, respondis Kovalev. „Kaj tial“, daŭrigis li: „mi petas vin, ke vi anoncu sekvanton; se iu kaptos ĉi-tiun malnoblulon, tiu devas nepre, senprokraste alkonduki ĝin al mi... Vi mem bone pripensu, kiel resti sen tia signifa parto de homa korpo? La nazo ne estas ia malgrandfingro sur la piedo, kiun oni ne rimarkos—ĉu mi havas ĝin aŭ ne, ĉar mi ĉiam portas la ŝuojn. Mi estas ĉiujafiĉe ĉe Ĉeltarev, edzino de regna konsilanto, ĉe Podtoĉina, Pelageja Grigorjevna—edzino de stab-oficiro... kaj



ŝi havas bonetan filionon...; vi mem juĝu, kion mi devas fari sen la nazo... Mi ne povas nun iri al ili..."

La oficisto ekpensis pri kio argumentis liaj premantaj lipoj.

"Ne, mi ne povas presi tiaspecan anoncon en la gazetoj", diris la oficisto post longa silento.

"Kial? Kial?" demandis Kovalev.

"Tial. La gazeto povas perdi sian reputacion. Se ĉiu homo komencos presi pri tio, ke ĉe li forkuris lia propra nazo, tiam... Kaj krom tio multe da parolas la legantaro, ke en gazetoj oni presas iajn falsajn onidirojn kaj kontraŝ sencaĵojn".

"Sed kial do mia afero estas falsaĵa? Mi pensas, ke ĝi tute ne havas ian falsaĵon..."

"Ĉi-tio nur al vi ŝajnas", rediris lu oficisto, "ke via afero nenion prezentas kontraŝencan. Sed jen, en la lasta semajno okazis tiaspeca akcidento: venis unu oficisto, tielsame kaj tielmaniere, kiel vi nun venis, kaj alportis unu noteton,

por kio li pagis 2 r. 73 k. Lia tuta anonco konsistis el tio, ke ĉe li forkuris unu nigra pudelo (hundo). Al mi ŝajnis, ke ĉi-tiu anonco prezentas nenion malbonan; sed fariĝis granda paskvilo: okazis, ke ĉi-tiu pudelo estis unu kasisto, mi ne memoras de kia institucio".

"Estimata sinjoro, mi ja ne petas vin presi anoncon pri pudelo, mi petas anonci pri mia nazo: signifas—ĉi-tio estas preskaŝ tute egale, se mi anoncos pri mi mem".

"Ne, mi tute ne povas presi tiaspecan anoncon".

"Sed mi efektive perdis mian nazon!" respondis kun ĉagreno Kovalev.

"Se vi perdis vian nazon bonvolu sin turnu al medicinisto. Oni parolas, ke ekzistas tiaj homoj, kiuj povas alglui al homo diversforman nazon. Sed, cetere, mi rimarkas, ke vi estas gaja homo kaj amas ŝerci en la societo".

"Mi ĵuras al vi Sanktan Dion! Se vi volas mi montros al vi glatan lokon, anstataŭ la nazo".

"Ne maltrankviligu vin!" daŭrigis la oficisto, flarante tabakon.

"Cetere, se al vi ne estos tre malfacile", aldonis la oficisto kun scivolema voĉtono, "bonvolu montru al mi vian glataĵon".

¶ Kolegia asesoro Kovalev deprenis de l' vizaĝo la naztukon.

Elrusigis V. Gogitidze

... (Daŭrigota)



Ingeniero Vladimir S. Kolubakin,  
fama esperantisto — kunlaboranto  
de „Kaŭk. Esp.“



## FORĜISTO

Batu feron per martelo,  
Forĝu ĉenojn per fervoro;  
El ĝemanta brusta ĉelo  
Sonu kantoj de l' laboro.

Forte tenu la prenilon,  
Kaj fajreru arda ŝtalo;  
Ŝvito—frukto de l' senigo  
Ekruliĝu, ekdefalu.

Forno flami kaj ruĝigu,  
Forno bruu, bruu mare;  
Via vivo—la korpiga  
Bezonego—brulu fajre.

Via sorto,—pulvo, fumo;  
Ĝi enhavas font' de l' morto;  
Malrapide en mallumo  
Vaporigas via forto.

Vundulcero, suferado  
Vian koron dismordetu;  
Ja do ŝvito, tolerado  
Naskas sekan panpeceton...

Batu feron per martelo,  
Forĝu ŝenojn per fervoro;  
El ĝemanta brusta ĉelo  
Sonu kantoj de l' laboro.

Ŝrind

## LARMOJ

De Hovanes Malhasjan

Frumatene, kiam mi ankoraŭ min trovis en la litaĝo, eniris en mian ĉambbron mia onklo kaj diris, ke nia blanka ĉevalino nokte naskis ĉevalidon. Mia infana koro tre ĝojis. Baldaŭ mi vestigis kaj rapide kuris en la ĉevalojon por vidi mian longe deziratan songon. Mi malfermis la pordon de la ĉevalejo kaj rimarkis la novenaskiton. Ĝi estis tiel nigra kaj brila, kiel nigraj sukcejoj.

Ĝi estis ronda, bela, rekta! Kun granda ĝojo mi kuris al ĝi por ĉirkaŭpreni kaj kisi ĝin. Ĝi ektimis de mia atako, forkuris al sia patrino kaj staris ĉe la manĝujo. La patrino blekis mallaŭte, flaris ĝin, proksimigis sian buŝegon al ĝi kaj kvazaŭ diris: «Ne timu, li estas nia am'ko», kaj permesis min proksimiĝi.

Mi altuŝigis ĝian nigran kapon kaj kolharojn, kiuj estis tiel molaj, kiel veluro kaj silko. Mi palpis ĝian dorson, piedojn kaj, ĉirkaŭprenante ĝian buŝegon kaj vizagon, kisis kaj ĝojplene eliris el la ĉevalejo por komuniki al miaj kolegoj mian feliĉon.

Estis bela printempo. El kvar flankoj de l'mondo petole fluis riveretoj, fontoj kaj aliaj akvoj, de kiuj pleniĝis la ebenaĵoj kaj poste, kunigante unu kun alia, ili fluis rapide al maroj.

La floroj, herboj, arhoj kaj arbetoj, liberiginte el la malliberejo de l'naturu, kurage elmetis siajn belegajn verdajn kapojn. La langoj de l'birdoj libere kantadis benkantojn pri la Dia liberdonaco. La venteto per siaj flugiloj alportis de ĉiuj flankoj de l'mondo la sonoradon de libereco. La ĉielaj nuboj jam kurage nagadis en la ĉiel-spaco... ili jen vokis, jen kilegis, jen pluvus...

Ho ve! iliaj langoj longe restis mutaj, ili trovis sin en la mallumo kaj la guto de l'ĝoja larmo estis malsekiĝinta...

La bestoj kun senlima ĝojo saltadis sur la verda kaj kontentigis sian vivan soifon.

Mia nigrakolora ĉevalido ankaŭ saltadis. Ĝi ne volis ripozi, ĝi turnigis ĉirkaŭ sia patrino, kuris, kuradis, denove, proksimigis al sia patrino, manŝutis la dolĉan lakton kaj daŭrigis sian saltadon... Vespere, kiam la ĉevalaro revenadis en la vilaĝon, mi iradis por alpeli domen mian ĉevalidon kun ĝia patrino.

Unu tagon, kiam mi laŭ mia kutimo iris alpeli ilin domen, mi ne povis trovi mian ĉevalidon en la ĉevalaro. Mi ĝin ne trovis, mi ne trovis ankaŭ ĝian patrinon—la ĉevalinon.

Kun granda malĝojo mi revenis hejmen kaj rakontis pri tiu-ĉi okazo al mia onklo. Mia onklo mallevis sian

kapon, iom meditis, poste sidigis sur la ĉevalon kaj ekiris ilin serĉi.

Tre malfrunokte li revenis domen neniun trovinte, kaj diris, ke frunatene li ree devas iri serĉi ilin malproksime.

Jena nokte mi tute ne povis dormi kaj kiam matenigis, ni—kelke da homoj, iris ilin serĉi.

Mi transiris unu valon, suprenigis sur la monton Geogdag, poste turnis miajn paŝojn al la najbara ebenaĵo, kiu ĝis hodiaŭ estas nomata «Gelbner» (Lupnestoj). Tie mi rimarkis blankan punkton. Mi ĝin tuj rekonis: ĝi estis mia ĉevalino... ĝi staris senmove sur sama loko mallevinte sian kapon; nur ĝia blanka vosto moviĝis de zefiro.

Mi aliris.

Kiam ĝi min vidis, ĝi malĝoje blekis kaj denove mallevis sian kapon.

Mi proksimiĝis al ĝi kaj vidis freŝan ostaron antaŭ ĝi. Mi terurigis kaj tetaniĝis; antaŭ mi kuŝis la ostoj de mia ĉevalido, mi ĝin rekonis pro ĝiaj nigraj hufoj. Estis klare, ke ĝin inanĝegis lupoj kaj restigis nur ĝiajn ostojn.

Kun profunda sopiro mi rigardis la patrinojn kaj vidis, kiel la besto flaris la ostaron de sia ido, versante en sama tempo pluvegsimilajn larmojn. Vidante tion, mi ne povis indiferenta rigardi; mi sentis profundan kompton al la multesprimplena senlingvulo. Mi ankaŭ sopiris kaj miaj okuloj pleniĝis de larmoj.

Estis malfrue; mi volis preni ĝin de la kapharoj kaj alpeli domen, sed ĝi senkontente ŝancelis la kapon, forigis de mi siajn kapharojn kaj ree komencis sian flaradon, ĝi komencis leki la restaĵojn de sia ido. La larmoj fluis. Baldaŭ min trovis mia onklo. Ni ambaŭ vestis enbuŝaĵon kaj repelis ĝin domen.

Sed de tiam ĝi ofte vespere ne revenadis domen kaj mi, por trovi ĝin, ĉiam iradis en la lokon, nomitan «Gelbner» kaj konstante mi ĝin vidis tie—apud la tombo de sia ido kun larmplenaj okuloj.

Tiam nur mi sentis, kiom vi estas granda kaj varma, ho, la patrino sento!

Elarmenigis Hajk Ter-Astv.



## ESPERANTO SUPER ĈIO!

Esperanto super ĉio, super ĉio en la mond',  
Plivastigu kaj kreskiĝu en la homa ĉia rond':  
De Alasko ĝis Grahamland', de la Kongo ĝis Ganges,  
Esperanto! venu ĉien, estu lingvo de ĉies!

Kantojn, himnojn kaj poemojn, paroladojn kaj rakont'  
Faru ĉiam esperante! ho, popoloj en tutmond'!  
Vivu la entuziasma heroeco en la kor',  
Iru, fratoj, kuraĝege al la venko kaj honor'!

Floru, vivu, Esperanto, plivastigu inter ni,  
Kara lingvo, Esperanto!—Estu ĉiuj aspirataj nun de ĝi!  
Unu lingvo en tutmondo, komprenilo inter ni:  
Donos pacon kaj justecon, de l' feliĉo garanti!

Laŭ la tutgermana kanto: «Deutschland, Deutschland über alles».  
Germanujo super ĉio... B. Michalik

Hamburgo, 7 Aŭgusto 1910.

### HUMORAĴOJ

La azeno de unu vilaĝano mortis. Irante en najbaran vilaĝon, li laŭvoje renkontis sian konaton. La vilaĝano demandis:

—Ĉu oni parolas en via vilaĝo, ke mia azeno mortis?

—Ne, oni nenion parolas.

—Ho, ke ĝi estu tiel! ekkriis ĝoje la vilaĝano.

Edzino: Vi ree tiel malfruigis?! Hieraŭ vi revenis hejmen je la dua horo nokte!

Edzo: Ne, je la unua: kiam mi revenis, la horloĝo ekbatis la unuan horon; mi intence aŭskultis tre atente—post kelka tempo ĝi denove ekbatis nur unu fojon...

D. Ĉu vi ludas gitaron?

R. Nek mi nek mia frato.

Ivan, aĉetu funton da sukero, diras oficiro kaj donas al sia servisto moneron je dudek kopekoj; kaj ankoraŭ aĉetu tri citronojn—daŭrigas li kaj donas alian moneron dudekkopekan.

La servisto foriras.

Post kelka tempo li revenas nenion aĉetinte.

—Kio okazis?! demandas la oficiro.

—Mi forgesis, via moŝto, por kia

monero mi devas aĉeti sukeron kaj por kia—citronojn.

Mi petis mian malgrandan fraton iri demandi de nia najbaro, kioma estas la horo. Li iris, demandis, restis ludi kun siaj kunuloj kaj kiam post kelkaj horoj li revenis, diris:

—Estas la oka kaj duono.

Malgranda knabo iris ĉe siajn kolegojn—la infanojn de la najbaro. Ili ludis iom, sed poste ili interbatigis. La knabo revenis hejmen kaj vidinte, ke siaj gepatroj ne estas dome, silente okupiĝis je io.

Kiam la gepatroj revenis, li komencis plori, kaj kiam ili demandis—kial do li nun ploras, li respondis:

—Tiam vi ne estis dome...

Esperantigis V. S.

### B O R J O M

(Korespondaĵo).

En la mezo de suda Kaŭkazo, proksime de Tiflis (5 hor. fervoje) sin trovas mirinde bela anguleto—Borĵom.

Ĝi okupas longan intermonton, kiu estas ĉirkaŭita per arboriĉaj montoj.

En la fundo de l' intermonto, meze

de Borĵom, trakuras du riveroj, ornamitaj per sufiĉe beletaj pontetoj. Unu el du riveroj estas nia fama „Kura“ kaj la dua—rapida monta rivero „Borĵomka“, kiu pelas siajn kristalajn travideblajn ondojn, ĉiam bruante.

Borĵom similas urbon per siaj belaj konstruaĵoj, inter kiuj unuan lokon okupas tri kasteloj de reĝfamiliaj Grandaj Princoj.

La kasteloj estas vere mirindaj per siaj ĝardenoj, fontoj, konstruaĵoj kaj riĉeco kaj lukseco de l' ĉambroj.

Borĵom estas heredbieno de l' Grandaj Princoj kaj ili multe zorgas pri ĝia bonstato kaj elspezas ĉiujare po 300 miloj da rubloj por la zorgado.

Borĵom estas la plej amata somerloĝejo ne nur de kaŭkazanaj, sed ankaŭ de nordrusujanoj; ĉi tien plezure alveturas personoj el diversaj urboj kaj urbegoj, eĉ el granda Peterburgo kaj Moskvo. Por oportuneco de l' alveturintoj, krom privataj loĝejoj, en Borĵom estas kvin hoteloj. Kelkaj el ili estas belege aranĝitaj, kun elektra lumigado kaj t. p.

Prezoj por loĝejoj kaj nutraĵoj estas sufiĉe altaj, tamen neniam Borĵom estas malplena. Ĝi allogas homojn per siaj multenombraj ecoj.

Unuj alveturas ĉi tien por ripozo kaj admiro, aliaj—por gaja pasigo de somero kaj kelkaj—por resanigo.

